Tio, kion signifas traduki

P. Andres

Ĉu oni povas traduki? Kion? La fama itala proverbo „*Traduttore, traditore*", kiun mi ne sukcesis traduki sen perfidi ĝin (mi proponas Tradukisto, perfidulo — sed, mi ne konservas la vortludon!), ŝajnas negativa respondo.

Tamen, ĉiutage, oni tradukas, almenaŭ por kompreni aliajn kulturojn, por fari ekonomiajn interŝanĝojn, por komuniki. Kompreneble, traduko estas kompleksa fenomeno, kaj mi deziras substreki nur kelkajn praktikajn aspektojn.

1 Traduko laŭ socia perspektivo

Fakte, traduko ne funkcias nur kiel lingvistika procezo, sed ankaŭ kiel socia demando en situacio. Tempo kaj spaco formas du limojn, en kiuj, ekde kiuj, tradukistoj laboras. Traduko ne estas pura koncepto. Oni devas do ĉiam difini la kompleksajn rilatojn inter la devena kaj la cela lingvo.

1.1 Traduko kaj diakronismo en la sama lando

Ĉu eblas kompreni niajn proprajn kutimojn dank' al niaj malnovaj tekstoj? Kiam oni lernas lingvojn, oni lernas ambaŭ sinkronisme kaj diakronisme. Ofte, oni devas ekkoni la multajn transformojn pri gramatiko, fonetiko, sintakso, kaj finfine, leksiko. Do, oni bezonas lerni nian nacian lingvon kiel fremdan! Tamen, ne ĉiuj lernas lingvojn tiamaniere, sed nur tradukistoj, instruistoj — unuvorte — intelektuloj! Nu estas pli facile lerni regulojn pri gramatiko aŭ fonetiko (fermitaj sistemoj), ol la regulojn pri leksiko (malfermita sistemo). Ekzemple, kiam oni deziras legi aŭ instrui la francan epopeon *La Chanson de Roland*, ĉu la francdevena lernanto povas kompreni sian kulturon sen tio ke li risku erari?

Li quens Rollant ad la buche sanglante
De sun cervel rumput en est li temples,
L'olifant sunet a dulor e a peine.
Karles l'oit e ses Frenceis l'entendent.

Nur rilate al leksiko, la lernanto devas zorgi pri la multaj falsaj amikoj, kiel *buche, temples, a peine,* kiuj signifas modernfranclingve peco de ligno, eklezio, triste. Li devas ankaŭ lerni la arkaismon *olifant*, kiu estas korno. Sintakse, la litero *s* ne funkciis tiam, kiel signo de la plurala formo, sed kiel nominativo. Fonetike, la vokalo *u* valoris kiel la nuna vokalo *o* . Grafikaj formoj do varias diakronisme. Kial traduki? Kun kia celo? Mi opinias, ke la edukà perspektivo sufiĉus sed ankaŭ la plezuro malkovri nian kulturon kiel fremdan.

1.2 Traduko kaj sinkronismo en la sama lando

Estas alia formo de traduko, en ĉiuj landoj. Ĝi ne konsistas en formala aktiveco, sed en uzado de malsamaj lingvoniveloj, kiuj dependas ĉefe de nia profesio kaj de la cirkonstancoj.

Franclingve, ĉiu landano konas la vorton neĝo, sed nur la skiistoj scias pri la variaj vortoj laŭ la malmoleco de la neĝo: polva, seka, blovita, glueca, malseka, kartonita ... Tradukonte la vorton neĝo, mi devos scii pri la kunteksto kaj ankaŭ kun kiu mi parolas. La tradukisto fakte devas zorgi pri hipertraduko. En la sama lando ankaŭ, oni povas trovi lingvojn, kiuj fariĝis dialektoj laŭ diversaj historiaj cirkonstancoj. En la norda parto de Francujo oni parolas diversajn dialektojn (en Burgonjo, Pikardio, Ĉampanio, Loreno ...), sed la dialekto parolata en Parizo fariĝis, pro politika centralizado, nacia franca lingvo. Finfine, dialektoj substrekas la specifecon de la geografia situacio. En la sama lando ankaŭ, oni parolas diversajn slangojn laŭ la profesio aŭ la aĝo de tiu, kiu parolas. La riĉeco de la lingvosistemo estas problemo por la tradukisto, ĉar ĉu li traduku ĉiujn ajn detalojn aŭ nur la universalan koncepton?

1.3 Traduko inter malsamaj popoloj

Ĉiu lingvo strukturas sian spacon. Trafe, oni parolas pri la malebleco traduki: solipsismo. Kiam oni uzas la koncepton traduko, oni ĉefe pripensas la skriban parton de la lingvo, sed oni forgesas la parolan. Ĉu eblas komuniki kun popoloj, kiuj havas nur parolan tradicion? Ĉu oni traduku parole aŭ skribe? Estas malekvilibro, kiam la etnografo studas la vivon de triboj, ĉar li lernas ilian lingvon, sed la membroj de la tribo ne lernas la lingvon de la sciencisto! Ne estas do vera komunikado. La parola parto de la lingvo eskapas ofte al tradukisto, ĉar li devas ĉiam kontroli skribe. Do skriba traduko estas necesa por kompreni aliajn popolojn, ĉar ni forgesis (almenaŭ en Eŭropo!) niajn parolajn tradiciojn. Ni bezonas skribitajn tekstojn, dank' al kiuj oni lernas la kutimojn de aliaj civilizacioj. Traduko formas duoblan procezon.

- Unue, oni tradukas por komuniki inter diversaj popoloj por eviti babelismon.
- Due, oni tradukas por garantii nian nacian influon.

Do ĉu ekzistas solvo?

2 Traduko laŭ lingvistika perspektivo

Tradukante, oni distingas diversajn nivelojn, kiuj dependas de nia komunikema situacio. Kiam mi parolas ILe,[1] ĉu mi tradukas? Kiel lingvistika ago, traduko bezonas klarecon, ĉar la mesaĝoj ne estu transformitaj.

2.1 Traduko, ilo por komuniki

Traduko funkcias kiel ilo por komuniki sed ŝajnas, ke estas vera problemo. Ekzemple, kiam francaj inĝenieroj mistradukas angle praktikajn informojn. Karakterizan ekzemplon donas J.P. Deth (dank' al B. Moon) en sia prelego al Unesko en Novembro 1985 pri la franca nova telefona numerado donita al anglaj jurnaloj (*Time*, 1985 10 28; *Daily Telegraph*, 1985 11 15) kun multaj eraroj:

- misuzo de tempformoj,
- verbuzo, anstataŭ la substantivo,
- hipertraduko ...

Por eviti tiujn ĉi gravajn erarojn, ĉu oni ne uzu la aŭtomatan tradukon, almenaŭ, kiel skribitan lingvon (DLT)? Fakte, multaj homoj malbone parolas la anglan lingvon, sed ili estas konvinkitaj, ke ili bone parolas ĝin! La malbona uzo de la angla lingvo estas terura afero por la angloj, eĉ se ili asertas, humure, ke vi bone parolas angle! Tiun ĉi ambiguecon, la Internacia Lingvo povas forigi. Do, sciencistoj proponis — ekde la XVIIa jarcento — neŭtralan tradukon, dank' al uzo de artefaritaj lingvoj. Kiel ilo, traduko ekzistas praktike. Sed, kion signifas bona traduko?

2.2 „Bona" traduko, laŭ la beletra kodo

Kial traduki *La Persajn Leterojn* de Montesquieu? Diversaj respondoj konvenas. Plezuro, amo pri la aŭtoroj de la XVIIIa jarcento, deziro venki lingvistikajn problemojn, ŝovinismo ... Fakte, oni konstatas, ke la tradukisto klarigis la tekston, tiamaniere, ke ĝi povu esti komprenata de ĉiuj. Do traduki ne estas pura paralelismo inter la lingvo 1 kaj la lingvo 2, sed interpreto, kio estas risko. Kompreneble, oni povas limigi tiun riskon dank' al aŭtomata traduko. La tradukisto sin demandis ĉu Montesquieu skribis kun ordinara leksiko, ĉu li celas difinitan publikon, kun kiu motivo li skribis, ĉu li - la tradukisto - devas traduki samnivele aŭ adapti sian tradukon al moderna publiko, kaj finfine, ĉu signifas la respekto de la teksto. La ĉefa problemo estas la elekto de unu ebleco inter la aliaj. Ekzemple, supozu, ke oni konsideras proverbojn kiel „bonan literaturon" — kial ne? — oni vidas la riĉecon de la eblecoj. Estas diversaj manieroj por esprime ILe la francan proverbon *Aide-toi, le Ciel t'aidera*

[1] Kiam mi parolas la Internacian lingvon.

(4 fare de Zamenhof kaj 2 fare de L. Bourgois). Traduko dependas de la valoro, kion oni volas doni, konscie aŭ ne, al tiu aspekto (praktika aspekto *aider* aŭ religia aspekto Dio, preĝo ...). Ideologio ĉiam estas en la teksto kaj en la tradukisto. Traduki formas pragmatikan procezon.

2.3 Traduko, kiel ponto inter sistemoj

Traduko estas procezo tra homa sperto. Etimologie, oni konstatas, ke traduki (*transducere*) signifas movon ekde $\longrightarrow$ ĝis . Sed ankaŭ, traduko estas la rezulto de tiu ĉi dialektiko, unuvorte la kio kaj la kielo . Do, kiel parolanto aŭ skribanto, mi estas loko de kontakto inter lingvoj. Individuaj kaj kolektivaj influoj kongruas en la sama tradukisto, substrekante la variajn interrilatojn. Sed ĉu interrilatoj estas negativa koncepto? Obstakloj estas necesaj por komuniki. Ekzistas malsamaj niveloj en la ago de komunikado, do ekzistas malsamaj niveloj en la traduka procezo. Laŭ mia opinio, traduko formas nur unu el la diversaj ligiloj inter homoj, nur unu ponto en la kompleksegaj komunikemaj rilatoj.

Finfine, traduko estas pragmatika realeco inter tiuj, kiuj uzas la signojn. Ne estas absoluta procezo. Eblas traduki tamen, ĉar oni rimarkas komunikajojn inter grupoj. Scienco estas, ekzemple, universala ilo, kiu kunigas homojn (Arto ankaŭ!). Sciencistoj ne bezonas tradukon, ĉar ili partoprenas al sama idealo. Do ILo funkcias preskaŭ kiel „natura" ponto inter ili. Laŭ Martinet:

> (...) konvenas certigi lingvistikajn rilatojn inter personoj kiuj partoprenas en sama civilizacio aŭ kiuj atingis similan gradon de evoluo (...). Kaj se tiu lingvo devas esti monda, estas kial tiu formo de civilizacio strebas hodiaŭ esti monda.

Tiu lingvo funkcias, ĉu ne?

Bibliografio

- Eichholz, R. *Esperanto kiel interlingvo en maŝina tradukado*, represajo el „Akademiaj Studoj 1985".
- *Homa lingvo kaj komputilo*, Interkomputo, Budapest, 1982.
- Lo Jacomo, F. *Plurilinguisme et Communication*, SELAF, 1986.
- Ladmoral, I.R. *Traduire*, Théorèmes pour la traduction, Payot, 1979.
- Mounin, G. *Les problèmes théoriques de la traduction*, Gallimard, 1963.
- Serres, M. *La Traduction*, Hermès, Minuit, 1974.